

Bulgara **ESPERANTISTO**



1966

5

REPREZENTA ENTREPRENEJO

„BULGARA ROZO“

urbo PLOVDIV

Telefonoj:

Direkcio — 30-84

Fako por planado

kaj provizado — 63-64

PRODUKTADO

DE

altkvalitaj eteroleoj:

el rozoj,

el lavendo,

el nigra pino (*Pinus nigricans* Host)

el pino blanka (*Pinus silvestris* L.)

el abio, junipero, geranio kaj mento.

Oni produktas ankaŭ rektifitan mentoleon.

Kovrilpaĝo: Rikoltistino de rozfloroj en la Valo de la Rozoj.

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por m²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 10 —a.

GRANDA SLAVA FESTO

De longaj jaroj nia popolo festas solene la 24-an de Majo — la Festo de la slavaj literaturo kaj kulturo. Jam 11 jarcentojn ekzistas la slava kulturo. Multaj fremdaj invadintoj trapasis la limojn de la slavaj landoj kaj kruele per glavo kaj sango penis neniigi la slavan kulturon. Sed tamen la slava literaturo kaj kulturo restis kaj de Bulgario eniris en multajn aliajn slavajn landojn.

Pri la komenco de la bulgara (kaj ĝenerale slava) skribo rakontas la malnovbulgara verkisto Ĉernorizec Hrabâr (X-a jarcento):

*„Dum la slavoj estis idolanoj ili ne havis skribon, sed per strekoj kaj aliaj signoj provis legi kaj skribi. Kiam ili kristaniĝis, ili estis devigataj skribi la slavan parolon per grekaj kaj latinaj literoj sensisteme. Tamen ĉu oni povas skribi per grekaj literoj **bog** (dio), **ĵivot** (vivo), **ĉakanje** (atendado). (La tiama kaj la nuna greka alfabeto ne enhavas la literojn b, j, ĉ — noto de la redakcio). Tial la slavoj bezonis sian propran skribon“.*

Jam en la jaro 855 la fratoj Kiril kaj Metodij pretigis la slavan alfabeton. Ili tradukis diservajn kaj aliajn librojn de la latina kaj greka en la lingvon de la bulgaraj slavo. En 863 ili iris al Moravio por disvastigi la kristanismon kaj la skribon en la slava lingvo. Tiam la lingvoj de la apartaj slavaj gentoj estis multe pli proksimaj ol nun. Tiamaniere parolante la lingvon de la bulgaraj slavo, Kiril kaj Metodij estis bone komprenataj de la slavo en Moravio. Ilia agado en Moravio estis fakta komenco de interslavaj literatura kaj kultura kunlaboroj. Nun post pli ol 11 jarcentoj tiu kunlaboro estas ege pli vasta.

Tre rapide la bulgara kulturo riĉiĝis kaj la bulgara literatura lingvo povis esprimi la plej subtilajn pensojn en la religia kaj filozofia literaturoj de tiu epoko.

El Bulgario la slavaj skribo kaj kulturo transiris al la serboj, al la rusoj, eĉ al kelkaj neslavaj popoloj — la mongoloj kaj la rumanoj. La lastaj uzis la slavan alfabeton ĝis la antaŭpasinta jarcento.

Kiam hodiaŭ ni skribas pri la kultura heroaĵo de la fratoj Kiril kaj Metodij, ni ne povas ne rememorigi al ni pri la arda defendo de ilia granda verko, kiun la senmorta filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov faris ĉe la ekstreme dramecaj cirkonstancoj en la proceso en Leipzig en la jaro 1933. En sia famekonata konkluda parolado la elstara aganto de la bulgara kaj internacia komunista kaj laborista movado prenis sub defendo sian bulgaran popolon kontraŭ la senrespondecaj atakoj kaj kalumnioj adresitaj al tiu popolo-martiro de la perdintaj ĉian modestecon hitleristaj altranguloj. Jen kelkaj citaĵoj de tiu bonege argumentita defendo, en kiu oni donas alte patriotisman rekonon de dankemo al la meritoj de Kiril kaj Metodij:

„La gazetaro ne nur insultis min ĉiamaniere — al tio mi estis indifera — sed samtempe oni nomis mian popolon „sovaĝa“ kaj „barbara“ ... kaj mi ne povas preterlasi tion silente.

Estas vere, ke la bulgara faŝismo estas sovaĝa kaj barbara. Sed la bulgaraj laboristoj kaj vilaĝanoj, la bulgara popola inteligentularo tute ne estas sovaĝuloj kaj barbaroj... Popolo, kiu kvincent jarojn vivis sub fremda jugo, ne perdinte sian lingvon kaj naciecon, nia laborista klaso kaj vilaĝanoj, kiuj batalas kontraŭ la bulgara faŝismo kaj por la komunismo — tia popolo ne estas sovaĝa kaj barbara. Sovaguloj kaj barbaroj en Bulgario esuas nur la faŝistoj. Sed mi demandas vin, sinjoro prezidanto, en kiu lando la faŝistoj ne estas barbaroj kaj sovaĝuloj?

Longe antaŭ la tempo, kiam la germana imperiestro Karlo la Kvina diris, ke en germana lingvo li parolas nur al siaj ĉevaloj, kaj la germanaj korteganoj kaj kleruloj verkis nur en la latina kaj hontis pro la germana lingvo, en „barbara“ Bulgario la apostoloj Kiril kaj Metodij estis kreintaj kaj disvastigis la antikvan bulgaran literaturon.

... Mi ne havas kaŭzon honti, ke mi estas bulgaro, kaj mi fieras, ke mi estas filo de la bulgara laborista klaso“.¹

Nun multaj milionoj de la homaro — de Adriatiko ĝis la bordoj de Pacifiko kaj Norda Glacia Oceano — uzas la slavan alfabeton. Per slava alfabeto estas skribitaj la senmortaj verkoj de Al. S. Puŝkin, L. N. Tolstoj, V. I. Lenin, M. Gorkij, Hr. Botev, Iv. Vazov, N. J. Vapcarov, Janka Kupala, Branislav Nuŝiĉ k.a.

En slava alfabeto estas la unuaj surskriboj ekster nia planedo — la sovetiaj blazonŝildoj sur la Luno kaj Venuso.

Senmorta estas dum 11 jarcentoj kaj senmorta restos la verko de la kulturaj revoluciuloj Kiril kaj Metodij, pri kiuj la popolo kantas:

*„Benitaj estu poreterne,
ho vi, Metodij kaj Kiril’ —
de la kultur’ bulgara patroj,
de nia lingvo — apogil’!..“*

Nikola Uzunov

1. Georgi Dimitrov, Verkaro, volumo 9, p. 260—261.



DIMITR DIMOV

La 1-an de aprilo ĉijare en Bukaresto subite mortis la eminenta bulgara verkisto — romanisto kaj dramaŭtoro, prezidanto de la Asocio de la Bulgaraj Verkistoj, laŭreato de la premio „G. Dimitrov“ kaj merita aganto en la sfero de la kulturo — Dimitr Dimov. Pro tiu morto nia socialisma kulturo perdis unu el siaj plej elstaraj reprezentantoj



Dimitr Dimov estas naskita je la 25-a de junio 1909 en urbo Loveĉ. Proksima parenco de la granda revoluciulo Jane Sandanski, li kreskas kaj estas edukata en patriotisma spirito. Jam de sia infanaĝo Dimitr Dimov konatiĝas kun la vivo kaj la bataloj de la tabaklaboristoj. Ricevinte sian abiturientan diplomon en Sofia, li studas veterinaran medicinon kaj depost 1939 dediĉas sin al scienca kaj instruista laboro. Kiel profesoro ĉe la Supera Agrar-ekonomia Instituto „G. Dimitrov“ kaj ĉe la Supera Veterinara-medicina Insti-

tuto en Sofia, Dimitr Dimov akiras la amon kaj la estimon de la tuta studentaro.

Dimitr Dimov eniris la bulgaran literaturon en la jaro 1938 per sia romano „Leŭtenanto Benc“. Per sia dua romano „Kondamnitaj Animoj“ Dimitr Dimov firmigis sin kiel unu el niaj plej talentaj beletristoj, majstro de la psikologia analizo kaj de la harmonia verkado. Veran literaturan gloron alportis al Dimitr Dimov lia romano „TABAKO“ — unu el la eposaj verkoj de la nuntempa bulgara literaturo, unu el la plej altaj atingoj de la nuntempa tutmonda beletristiko. Laŭ senprecedenca maniero Dimitr Dimov pruvis la moralan degradon, la agonion de la bulgara burĝaro kaj ties mortkondamnon fare de la historio. En liaj verkoj estas detale kaj impone priskribitaj la bataloj de la laboristaro kontraŭ la ekspluatistoj kaj kontraŭ la perfiduloj de la Patrolando. Antaŭ la imago de la leganto aperas sinsekve tuta galerio de belegaj figuroj, inter kiuj reliefiĝas precipe la herooj-komunistoj, la apostoloj de la revolucio.

Dum la lastaj jaroj Dimitr Dimov distingiĝis kiel granda dramverkisto.

Liaj dramoj „Virinoj kun pasinteco“, „La Kulpulo“ kaj „Ripozo en Arko Iris“ riĉigis nian teatron per nova problemaro kaj novaj karakteroj, saturitaj de forte emocia drameco.

Dimitr Dimov ligis profunde sian verkadon kun la agado kaj la politiko de la Bulgara Komunista Partio. Li estis arda adepto de la principoj de partieco kaj nacieco de la literaturo.

Kiel prezidanto de la Asocio de l' Bulgaraj Verkistoj, Dimitr Dimov inde plenumis sian devon. Sian tutan ardon li dediĉis konstante al la unuecigo de la

fortoj de la verkistoj, por la idee-arta evoluado de nia literaturo.

Dimitr Dimov estis unu el la plej aktivaj pioniroj por proksimiĝo kaj kunlaborado inter la verkistoj de la Balkana Duoninsulo. Lia nomo ĝuis grandan aŭtoritaton en nia lando kaj en eksterlando.

Kiel verkisto, sciencisto kaj civitano, Dimitr Dimov fordonis ĉiujn siajn fortojn kaj kapablojn, sian grandan talenton por la florado de la bulgara literaturo kaj kulturo.

Pro siaj meritoj al la literaturo kaj al la popolo, Dimitr Dimov estis hono-

rita per la altaj titoloj „Laŭreato de la Premio G. Dimitrov“ kaj „Merita aganto en la sfero de la kulturo“. Li estis premiita ankaŭ per la ordenoj „Popola Respubliko Bulgario“ kaj „Ruĝa Standardo de la Laboro“.

La subita morto trafis Dimitr Dimov sur lia posteno. La honesta vivo de la verkisto-komunisto Dimitr Dimov lasos post si brilan spuron en la bulgara literaturo kaj estos edifa ekzemplo de sindona servo al la popolo kaj la Partio.

Funebrante, ni klinas nin respekto-plene antaŭ nia karmemora Dimitr Dimov kaj liaj grandaj meritoj.

„TABAKO“

romano de D. Dimov

(fragmento el la tria eldono)

Proksimiĝis la fino de septembro kaj en la kvartalo de la fabriktenejoj ŝvebis trosaturitaodoro de fermentanta tabako. Ambaŭflanke de la strato kondukanta al la stacidomo la robinioj melankolie ŝutadis teren siajn velkflaviĝintajn folietojn. La manko de vento pliintensigis la sufokvarmegon. La nuboj el subtila, kalkblanka polvo, kiuj formiĝis malantaŭ la ŝargaŭtoj, elveturigantaj la prilaboritan tabakon, faris la varmegon ankoraŭ pli malagrabla kaj netolerebla. La polvo gluiĝis al la ŝvitantaj vizaĝoj de la laboristoj, penetris iliajn buŝojn kaj kraketis inter la dentoj.

Lila laboris ĉiutage en la tabaktenejo, situanta proksime de la tenejo de la firmo „Nikotiana“. Iun posttagmezon, elirante post la fino de sia laboro, Maks Eŝkenazi rimarkis ŝin sur la strato. Pli-rapidiginte siajn paŝojn, li atingis ŝin.

— Atendu, Lila! Mi volas sciigi ion al vi. . . — li alparolis ŝin meze de la svarmo da laboristinoj, kiuj en la momento forlasis la tenejojn kaj iliaj lignoŝuoj brue klakis sur la trotuaro. — Mi ĵus ricevis leteron de Pavel. . . Ĉu vi konsentus, ke ni ambaŭ iru ien

por trinki po unu bozao¹ kaj samtempe ni interparolos iom?

Unuamomente Lila travivis la konatan ĉagrenon, sed tuj poste ŝi rapide sukcesis ekregi sian emocion kaj respondis indiferece:

— Konsentite

Ili eniris malgrandan, mizeraspektan sukeraĵejon en kiu ne estis klientoj. Maks mendis du glasojn da bozao. La mastro alportis ilin kaj tuj eliris, havante ian laboron ekstere.

— El kiu lando li anoncas sin? — demandis Lila, kiam ili jam sidis ĉe la malpura tableto.

— El Argentino — respondis Maks kaj ĵetis esplorrigardon al Lila.

— El Argentino?! . . . — La koro de Lila ekspasmis dolore — Verŝajne li oscedas tie en ombro sub la palmoj. . .

— Do, vi ne ĉesas ĉikaneme kritiki lin maljuste! . . . Sed aŭdu, en tiu lando ekfuriozis grandiozaj strikbataloj en la regionoj de la nafto-fontoj. . . Pavel plej aktive partoprenis en tiuj

¹ Bozao — speciala orientlanda miliotrinkaĵo

bataloj kaj nun li estas membro de la Argentina Komunista Partio.

— Jes! . . .

Lila povis diri nenion pli.

Ŝi sidis senmove, spiritforeste, kun rigardo direktita al la gelaboristoj, preterpasantaj sur la trotuaro. Rimarkinte ŝin, ili ridetis indulgeme, sed sen ironio, kvazaŭ dezirante diri: „Nu, vidu nur! . . . Nia Lila fine decidiĝis viziti sukeraĵejon, tamen ŝi elektis por si akompananton, kiu povus esti ŝia patro!“ Sed tuj ili konjektis, ke certe temas pri problemoj, koncernantaj la Komunistan Partion.

En tiu momento, en la imago de Lila aperis la figuro de Pavel kaj reliefiĝis pli klare kaj pli emocie ol iam ajn antaŭe. Do, jen kia homo li estis efektive! . . . Kaj kiom maljuste ŝi opiniis lin nur kiel lertan fraziston! . . . Eĉ post kiam oni ekskomunikis lin el la Partio, li trovis en si moralan forton por batali en malproksima kaj fremda lando, por la triumfo de la komunismaj ideoj.

— Kion alian li skribas? — Lila iel nerve demandis.

Ŝi ekscitiĝis, sentante sin ĝenata pro la fiksita kaj explorema rigardo de Maks,

kiu evidente divenis jam ŝian opinion pri Pavel.

— Li skribas ankaŭ, ke oni vundis lin — respondis Maks. — Kuglo traboris al li la femuron, ne kaŭzinte gravajn difektojn. . . Nun li troviĝas en stato de resaniĝo, atendante la tagon, kiam ree li povos partopreni la batalon.

La koro de Lila ekbatis pli forte pro subita angoro. Ekŝajnis al ŝi en la momento, ke la tago mallumiĝis. La parolbruo de la preterpasantaj sur la trotuaro gelaboristoj tuj estiĝis malproksima kaj obtuza. La novaĵo konsternis ŝin kaj ŝi eksentis vertiĝon. Sed bone konsciante ŝian plenan senpovecon kaj komprenante, ke Maks povus diveni ŝian emocion, ŝi tuj provis ekregi siajn sentojn.

— Li ja resaniĝos! . . . — ŝi diris malrapide, ŝajnigante sin tute indifera. — Vundo en la kruro ne povas esti danĝera . . . En plej malfavora okazo oni amputus al li la kruron aŭ eble li restos por ĉiam lamulo.

Maks ekrigardis ŝin iom mirigite, kaj Lila sentis sin kontenta pri tio.

Tradukis: Simeon M. Simeonov

LETERO EL MONGOLIO

En la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ estas ricevita letero de k-do L. Oĉirpurev el Mongolio. Li estas junulo, kiu gvidas E-kurson por komenctoj laŭ peto de la Mongola akademiano Runĉen. La kurso funkcias ĉe la Junpionira Palaco en Ulanbator. Ĝi konsistas nur el instruistoj ĉe tiu ĉi Palaco kaj la partoprenantoj tre fervore kaj entuziasme lernas Esperanton. Ĉiuj es-

peras, ke la laboro de la E-kurso, kiu estas la unua en Mongolio, donos baldaŭ rezultojn precipe inter la junularo.

Inĝ. Mitko Iv. Dimĉev, denaska esperantisto, filo de Zora Mladenova kaj Ivan Dimĉev — Hans el Varna, trapasis sukcese seriozan examenon por asistanto en la Supra Maŝin—Elektra Instituto en Varna. Niajn gratulojn! Ni esperas, ke li helpos la antaŭenpuŝon de Esperanto en la Instituto, kie la lingvo estas nedevige (fakultative) instruata.

Sciigo. Mi ricevis kolorajn diapozitivojn el Japanujo de la plej interesaj urboj Kioto, Kobe k. a. Parolante pri miaj impresoj pri Japanujo, kie mi estis invitita kaj restis du monatojn, mi povas montri la belegajn, kolorajn lumbildojn per projekcia aparato.

P. G. Pamporov

„HO, VIDI NIN VENU!“

de Ivan Vazov

Mi tiun ĉi vokon aŭskultas konstante —
en domoj, drinkejoj ĝi sonas plorkante.
Vilaĝan loĝejon eniras mi: sceno
plorinda, la tutan animon skuanta!
„Ho, vidi nin venu!“

La planko — ter' nuda! La muroj pro fumo —
eu nigra koloro; en griza mallumo
ĉifonoj kaj homoj. . .; aero venena —
hom' kuŝas ĉe bestoj sur sama sterk-humo. . .
„Ho, vidi nin venu!“

Malriĉo damninda! Animoj malspritaĵ;
infanaĵ, virinaj vizaĝoj — sulkitaj.
Sekala past' en fulgigita kameno
bakiĝas por gorgoj malsatturmentitaj.
„Ho, vidi nin venu!“

Mallum', dezerteco! Profunda mizero
la vivon senigas je ĝoj' kaj espero
Fetoras la kort' je brutsterko plenplena,
kaj regas malsanoj, kaj mort', kaj sufero
„Ho, vidi nin venu!“

Kaj ĉiam en ŝvito plej peza laboro,
rezult' — senhaveco, malĝoj' en la koro.
Por rido kaj kantoj — eterna malbena
Ĉi tie nur gastas mizer' kaj doloro.
„Ho, vidi nin venu!“

Kaj tiel forvelkas spirito kaj volo —
en nokto pereas la kor' sen konsolo:
konscio nenia en tiu kateno!
Bestiĝas ĉi tie vilaĝa popolo.
„Ho, vidi nin venu!“

„Ho, vidi nin venu!“ — Ni ĉiuj premataj
vin vokas, riĉulojn de ni grasigatajn. . .
Forlasu la borson kaj plu ne festenu,
rezignu la famon kaj frazojn pagatajn!
„Ho, vidi nin venu!“

Vi, kiuj posedas palacojn el oro,
vi, homoj tro sataj, ŝatantoj de l' gloro!
Nur ĵetu rigardon al nia geheno —
hirtiĝos tuj via harar' pro hororo. . .
„Ho, vidi nin venu!“

Kaj tiam eksentos vi vian frivolon,
skrupule, kompate vi havos helpvolon —
kor' via doloros pro frata kompreno. . .
Nur vorte ne amu la povran popolon!
„Ho, vidi nin venu!“

1899

Tradukis: *Petr D. Edrev*

(Premiita en la Literatura konkurso)

GAJA MOZAIKO

* — Do, vi uzas tri paroĵn da
okulvitroj!
— Jes, unu paro por longa rigardado,
dua — por mallonga, kaj tria —
por serĉado de la aliaj du.

* Du viroj konversacias:
— Mia filo ne vagas, ne fumas,
ne trinkas, ne parolas idiotajojn.
— Ho, vi havas unikan filon, —
respondas la dua. — Kian
aĝon li havas.
— Ses monatojn.

* — Peĉjo, kiu monato havas
28 tagojn?
— Ĉiuj, k-do instruisto!

* — Kaj kia fariĝos via filo post la
lasta ekzameno?

— Maljunulo.

* La familio de la etulo Toto, kies
domo estis detruita pro ŝtormo,
sendis lin al lia onklino en Parizo.
Post tri tagoj la familio ricevis
telegramon:

„Ni resendas Toton, komo, prefe-
rinde sendu al ni la ŝtormon,
punkto.“

* — Mi preferas esti morta! —
ĝemas la edzo.

— Mi ankaŭ! — ploras la edzino.
— Nu, tiam mi preferas vivi!

JUNA ESPERANTISTO

22-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO

23. VII. — 30 VII. 1966 — PÉCS,
HUNGARIO

La Loka Kongresa Komitato amike invitas la esperantistan junularon de la mondo partopreni la 22-an IJK-on de TEJO, okazonta en Pécs, en la suda parto de Hungario. Tie vi povos renkontiĝi ne nur kun la geamikoj el multaj diversaj landoj de la tero, sed en kadro de sep gajaj tagoj ekkoni la reprezentantojn de la hungara junularo, kiu kun varma amikeco etendas al vi siajn manojn!

Dum la Kongreso vi povos trovi gajajn amuziĝojn kaj seriozajn okupojn, tute laŭ via plaĉo. Unu afero estas certa: la tuta gastama loĝantaro kaj la aŭtoritatuloj de Pécs kore invitas kaj atendas vin — ni promesas fari ĉion plej eblan por akcepti kaj gastigi vin tiel, ke la semajno, pasigita en nia urbo estu por ĉiam neforgesebla!

* * * *

ŜIĜOJ PRI LA PROGRAMO DE LA 22-a KONGRESO DE TEJO

1. La paradan marŝon kun lampioj tra la urbo (24. VII.) ni deziras fari kiel eble plej impona kaj amuza. Fininte ĝin, sur la ĉefplaco la lokaj aŭtoritatuloj salutos kaj bonvenigos vin. Ni petas, ke vi, do, kunportu nacian vestaĵon kaj diversajn muzikilojn. Laŭ nia imago la parada marŝo okazos en naciaj kostumoj, muzikante kaj kantante.

2. La ĉeestantoj dufoje povos diskuti pri la problemoj de la junularo — nome la 25-an kaj 26-an de julio. Temoj sciigotaj.

3. La kunsidoj de la Komitato de TEJO okazos la 24-an kaj 27-an de julio.

4. La 27-an okazos futbalmatĉo inter la Kongresa kaj Loka teamoj. Bonvolu sur la aliĝilo aŭ en aparta letero sciigi nin pri posteno, kiun vi volas ludi. LKK prizorgos la necesajn ekipaĵojn.

5. La tuttaga ekskurso okazos la 28-an (jaŭde).

6. *Oratora konkurso*: pri la jenaj temoj —

a.) Sento de internaciismo en la junularo.

b.) Ĉu la nuntempa mondliteraturo fidele respegulas la vivon kaj la problemojn de la junularo?

c.) Kian bildon vi havis pri Hungario antaŭ ol viziti ĝin kaj kigrade tiu bildo modifiĝis en la lando mem?

La premioj:

Unua premio: 1000 forintoj

Dua premio: 500 forintoj

Tria premio: 300 forintoj

7. Aliĝado: Bulgara Esperanto-Junularo per aparta cirkulero al ĉiuj lokaj societoj klarigos la manieron de aliĝo kaj pago por la Kongreso.

Laŭ necese korespondu kun: Sofio, P. K. 587, BEJ.

Okaze de la forpaso de Saŝa Keremidĉieva kaj la naskiĝo de ŝia unua nepo Ivanĉjo la familio de Ivan Keremidĉiev Esperov donas 5 levojn por fonduso „Bulgara Esperantisto“.

La urbo Pécs, unu el la plej belaj kaj interesaj provincaj urboj de Hungario, situas sur la sudaj montodeklivoj de la montaro Mecsek, havas karakteron mediteranean. La urbo estas kvara laŭ la nombro de siaj loĝantoj (131,000). Ĉiuj vojoj en Pécs kondukas al la placo Széchenyi, ĝi estas la forno el kie la komencantoj eliras, la renkontiĝejo de la amantoj. La centra konstruaĵo estas tie la moskeo de paŝao Gazi Kasim. Ĝi estis konstruita en la 16-a jc. Tie ĉi staras la monumento de la venkinto super la turkoj, János Hunyadi.



La ĉefan lokon okupas en la panoramo de Pécs la kvartura katedralo,

PUBLIKA LETERO

de hungaraj olimpiaj ĉampionoj kaj sportistoj al la internacia Olimpia Komitato estis publikigita en „Népszava“ (Voĉo de Popolo), la centra ĵurnalo de la Landa Konsilantaro de la Hungaraj Sindikatoj en la numero de 30. jan. 1966. La leteron subskribis 26 elstaraj sportistoj. Ili turniĝas al la gvidantoj de la sportmondo, al la Internacia Olimpia Komitato per la peto: ili akcelu, ke dum la internaciaj sportaj renkontiĝoj ĉiam pli populariĝinta Esperanta lingvo estu akceptata kaj uzata kiel interkon-

kies sanktejo, la subtera preĝejo estis konstruitaj en la 11-a jc. Sub la arboj antaŭ la katedralo okazos la granda Kongresa Balo (sur la bildo estas videbla ankaŭ la subĉiela teatro, la estonta Inaŭgurejo de la Kongreso).

Sur la placo Kórház estis unu centro de la religia vivo de la turkoj. Tie staras eĉ hodiaŭ la moskeo de paŝao Jakovali Hassan, kiu apartenas kun sia sendifekta minareto al la plej grand-signifaj turkaj konstruaĵoj de la lando.

La loĝantaro de Pécs gastame atendas siajn vizitontojn dum la 22-a IJK de TEJO.

Béla Gellén

(Gvidanto de Informa Fakto de HEJ)

sentita, oficiala lingvo. Esperanto naskiĝis kiel vivanta plantido de vivantaj lingvoj kaj ĝi estas la plej facila, dum kelkaj monatoj ellernebla lingvo de la mondo kaj ĝi jam fariĝis komuna spirita trezoro de la popoloj.

La letero finiĝas per jenaj vortoj:

„Esperante la intensigon de la sportamikiĝo kaj de la olimpia ideo, ni atendas pozitivan apogon de la Internacia Olimpia Komitato kaj de la sporta publika opinio de la mondo.“

**LA VIRINOJ-ESPERANTISTINOJ EN SOFIO PLIBONIGAS
SIAN LABORON**

Por plibonigi sian laboron oni devas fari de tempo al tempo revuon de sia agado. Tion ĝuste faris la virinoj-esperantistinoj el Sofio. Antaŭ ne longe ili kunsidis kaj analizis la ĝisnunan agadon. Sekvis eldiroj, proponoj kaj la nova vojo estis planita.

Kie estas la virinoj en nia movado? Kia estas ilia laboro? Tute simpla estas la respondo: Ilia agado estas varia kaj multflanka. Ili povas organizi solenaĵon okaze de granda festo, ili povas esti unuaj en labortagoj, regule partopreni la kunvenojn, prepari raportojn ktp. Dank' al la laboremaj virinoj estas finkonstruita nia montodomo „Esperanto“, kie oni sentas sin en hejma atmosfero. Druĵevo estas ne nur ripozloko, sed samtempe kultura domo de kie

venos niaj estontaj kadroj.

Gastamaj estas la virinoj-esperantistinoj, kiuj gastigis niajn najbarlandajn geesperantistojn. La virinoj povas raportiti pri la virina revuo esperantista „Bulgarino“, kiu estas ido de la Sofiaj esperantistinoj kaj disvastigas la gloron de nia socialisma lando. La virinoj-esperantistinoj estas granda forto, kiu povas esti utila al la tuta Sofia esperantistaro. En ĝia konsisto ne mankas artistinoj, muzikistinoj, instruistinoj, pentristinoj, kuracistinoj, flegistinoj. Do, la vojo jam estas klara. Antaŭen! Tute simple ni diru: Nia laboro estu pli bonkvalita ol la ĝisnuna! Estis elektita estraro de la virina Komitato ĉe CK de BEA: Ljuba Bojaĝieva, Bogdana Popova, Trajana Petkova.

P.

LA VIRINOJ-ESPERANTISTINOJ EL SOFIO FESTIS LA 8-an DE MARTO

Dua Internacia Konferenco de la virinoj-laboristinoj decidis ke la 8-a de marto estu la tago de la virinoj. En multaj landoj oni starigis la tradicion festi solene tiun tagon. Kaj ne hazarde oni elektis tiun tagon — 8-a de marto estas lasta tago de la vintro kaj unua tago de la printempo. Printempo — la sezono kiam ĉio naskiĝas en la naturo. Kaj tiu simbolo parolas pri la virino — kreintino de la vivo.

La virinoj-esperantistinoj en Sofio organizis la celebradon de tiu granda festotago.

La salono estis plenplena, bone ornamita, okulfrapis la grandlitera slogano „Paco kaj Solidareco — 8-a de marto!“

K-ino Ljuba Bojaĝieva, la prezidantino de la virina komitato, malfermis la kunvenon. En la prezidantaro okupis lokojn la gekamaradoj

N. Aleksiev, N. Nanov kaj reprezentantinoj de E-movado — la maljunaj esperantistinoj D. Abaĝieva, I. Rajnova kaj V. Gaĉeva, proklamitaj kiel honoraj membroj de societo „Maksim Gorkij“. Bonan kaj interesan prelegon faris Tinka Lakova, sekretariino de MEM. Ŝi konkludis ke la virinoj en la mondo estas ĉiam en servo al la paco.

Sekvis salutparoladoj de k-doj N. Aleksiev kaj N. Nanov.

En la literatura-muzika programo partoprenis esperantistinoj kantistinoj el societo de la blinduloj, la geartistoj G. Kerelezov kaj Kostadin-ka Nedeva. Gelernantoj de la komerca gimnazio plenumis komedietojn, en kiuj estas traktataj la rilatoj inter la viroj kaj virinoj,

P. Ĉakova

Ĉar nia metilernejo estas nova, nur ekde 1958, do ni kolektas spertojn pri la edukado kaj instruado de mensmalfortaj infanoj. Bonvolu skribi al ni kaj peti informojn de ni aŭ proponi al ni, kion ni faru, kio estos plibonigenda kaj enkondukenda. Ni bonakceptos tian interŝanĝon pri spertoj. Skribu al: Josef Chvosta, Engelsova 289. II. 22, Podebrady, d. Nymburk, ĈEĤOSLOVAKIO,

Ŝumen. E-societo „Vekiĝo“ malfermis kurson por komencantoj, kiun partoprenis 32 ge-urbanoj; ĝin gvidis Rajna Kasabova dufoje semajne.

Post regula kaj diligenta studado, la kurso sukcese finiĝis dum februaro. La gekursanoj trapasis brile la ekzamenojn. La 20-an de marto, kiam okazis la jarkunveno de „Vekiĝo“, post mallonga amuza programo, plenumita de la gekursanoj, oni disdonis al ili la atestojn.

Du el la gekursanoj, la plej kapablaj, estis premiitaj.



La foto montras parton de la gekursanoj kun ilia kursgvidantino.

•••

La E-societo „Vekiĝo“ okazigis sian jarkunvenon la 20-an de marto 1966 j. Ĉeestis 37 personoj. Post la raporto estis diskutoj. Oni elektis novan estraron.

KUNVENO DEDIĈITA AL DANLANDO

Je la 28-a de februaro en la salono de la Urba Konsilantaro en Kazanlâk okazis E-kunveno al kiu gastis la sindona esperantisto Ĉernju Stanĉev el vilaĝo Mâglij. La prezidanto de E-societo „Roza valo“ k-do D. Martinov malfermis la kunvenon kaj per magnetofono ni aŭskultis la paroladon de la prezidanto de UEA — S-ro Ivo Lapenna. Post tio Ĉernju Stanĉev prelegis pri la norda lando Danio. La prelego estis tre interesa, kaj per ĝi ni eksciis multon pri la vivmaniero de la dana popolo.

Pri la E-movado en Danlando ni eksciis, ke tie nia amikaro faras klopĉojn por disvastigo de la lingvo internacia kaj por la tutmonda pacoŝtato per Esperanto. En la ĉefurbo Kopenhago estas kelkaj esperantaj kluboj kaj en unu el ili k-do Stanĉev prelegis pri nia belega socialisma Bulgario kaj pri la konstruado de la nova sociordo.

Ni esprimas nian dankon al k-do Stanĉev pri lia riĉenhava prelego.

Iv. Zahariev

LA VICOJ DE LA ESPERANTISTOJ EN ĈIRPAN PLIMULTIĜAS

La oktobraj sunradioj penetras en la vastan klasĉambrojn de la Vilaĝmastruma Teknikumo pri vitkulturado kaj vinberproduktado. La ĝelernantoj estis ĵus revenintaj de siaj praktikaj okupoj en la fekundaj vitkampoj.

En la komenco de la lernojaro la instruistino Nevena Vâlkanova vizitis la Direktorinon de la Teknikumo Liljana Genova. Dum la somero Vâlkanova sukcese finis la kurson de Esperanto por instruistoj, organizitan de E-societo „Verda Stelo“ en Stara Zagora kaj gviditan de Georgi Dimov el Varna.

Ŝi petis la Direktorinon se estas eble ke oni enkonduku nedevidigan studadon de Esperanto en la Teknikumo. Ŝi tuj akceptis la proponon.

Post la anonco, el ĉiuj 360 kursanoj de la Teknikumo, enskribiĝis 120 ĝelernantoj.



Jen ni estas inter la kursanoj de II „b“ klaso. La instruistino Vâlkanova eniras la klasĉambron. Ĉiuj ekstaras. La instruistino vokas la lernantinon Pobeda kaj demandas ŝin: „Kioman lecionon hodiaŭ ni havas?“

— Hodiaŭ ni havas la sepan lecionon — „La kooperativa bazar“.

— Nu, legu, Pobeda! Sufiĉe! — Vi, Aleksi, daŭrigu! Viciĝas en la legado kaj la traduko de la leciono ankaŭ Minka, Elenka, Petr. . . Evidentiĝas, ke ili bone sin preparas hejme. La instruistino estas kontenta kaj transiras al la nova leciono.

La elektra sonorilo anoncas la finon de la leciono.

— Ĝis revido, — salutas la instruistino.

— Ĝis revido, — ĥore respondas la junaj ĝesperantistoj.

Kaj tiel ĉiusemajne pasas la Esperantaj lecionoj, en 5 klasoj ĝis la sekvonta vendredo.

En la Vilaĝmastruma Teknikumo kreiĝas esperiga anstataŭantaro.

Blago Dimitrov

VARNA. La 6-an de oktobro 1965 estis malfermita kurso de Esperanto por komencantoj. La instruado estis laŭ la rekta metodo de Andreo Cseh. Por ĉiu leciono estis uzitaj konvenaj pervidaj rimedoj — objektoj kaj bildoj. La gekursanoj aŭskultis kun intereso la lecionojn kaj vigle partoprenis. La disciplino estis altnivela. Okazis nenia prokrasto de leciono.

La kurson regule vizitis 20 personoj, de la komenco ĝis la fino. Instruita estas la tuta antaŭvidita materialo.

La 29-an de oktobro okazis renkonto de la soveta ĵurnalistoj-esperantistoj Abram Gutmanis el urbo Riga — Letonia SSR, kun la gekursanoj. Kamarado Gutmanis, kiu vizitis la klubojn kun sia edzino Bluma, salutis la gekursanojn kaj bondeziris al ili sukceson en la lernado de Esperanto, la lingvo de la paco kaj amikeco inter la popoloj.



Ĉe la fermo de la kurso, Dimitr Dimov, prezidanto de E-societo „Albatro“, salutis la gekursanojn. Al la distingintoj li disdonis librojn. Ĉiu kursano kaj kursanino ricevis la E-insignon.

Je la nomo de la gekursanoj — Bojdar Igov, esprimis koran dankon al Petr Colov, la lektoro.

K-do Colov orientis la gekursanojn kiamaniere perfektigi en la lingvo.

Ĉiuj gekursanoj deklaris, ke ili aniĝas al la E-societo „Albatro“ kaj esprimis deziron daŭrigi la lernadon en kurso por progresintoj.

Ĉeestis tridek gastoj el Pollando.

G. Deev

Trjavna. La 28-an de marto 1966 okazis la jarkunveno de E-societo „Verda Standardo“. La prezidanto raportis pri la laboro de la societo dum la pasinta jaro.

Oni elektis novan estraron: prezidanto — Iv. Jankov Gânzov, sekretario — P. Avr. Harlov.

Vilaĝo Borovo, en la distrikto de Ruse. La 17-an de marto ĉ. j. okazis la jara kunveno de la loka E-societo, kie laboras fervore sindonaj esperantistoj.

Unu kuraĝa paŝo estis farita. La plimulto el la anoj de la nova estraro kaj la kontrola komitato konsistas el junaj kaj energiaj homoj. Honora prezidanto estas Mitju Ivanov, prezidanto — Georgi Cvjatkov, sekretario-kasistino — Radka Jordanova kaj 2 anoj.

R. Jordanova

Popovo. Je la 6-a de marto la E-societo „Homeco“ okazigis sian jaran kunvenon, kiun partoprenis amase la anoj el la urbo kaj el kvin vilaĝoj en la distrikto. Unu el la gravaj entreprenoj por la proksima estonteco estis la akceptita decido por enkonduko de Esperanto en kelkaj urbaj mezlernejoj pere de la direktoroj. Oni elektis novan estraron: prezidanto — Ilija Mirĉev, sekretario Genĉo Ganev, kasisto — Dobri Medovinski kaj du anoj.

G. Ganev

Stara Zagora. En marto 1966 estis organizita distrikta konferenco. Ĝin partoprenis la estraroj de la urbaj E-societoj en Stara Zagora, Kazanlâk, Ĉirpan kaj Radnevo, ankaŭ reprezentantoj de la vilaĝaj societoj.

Raporton pri la agado de D. K. kaj la societoj en la distrikto de Stara Zagora faris la prezidanto de D. K. Ivan Deĉev kaj projektoplanon tutjaran proponis la sekretario inĝ. D. Dobrev. Post la diskutoj estis akceptita rezolucio kaj plano, kiuj direktas la agadon de DK kaj la societoj dum 1966. La rezolucio kaj la plano antaŭvidas pluan disvolvon de E-movado en la distrikto. En la plano estas gravaj problemoj kiel: plua organiza stabiligo de la societoj precipe la vilaĝaj, helpi kaj aktivigi ilin, plibonigi la propagandon inter neesperantista publiko, plua enkonduko de Esperanto en lernejojn, organizo de kurso por instruistoj, plialtigo de la lingvaj konoj de la esperantistoj, plibonigo de la kolektiva korespondado de E-societoj k. a.

Estis elektita nova DK konsistanta el 19 personoj: la estraranoj de E-societo en Stara Zagora, la anoj de CK kaj reprezentantoj de la pli grandaj societoj en la distrikto.

Post la konferenco DK kunsidis kaj elektis Estraron: prezidanto — Ivan Deĉev, sekretario — inĝ. Dobri Dobrev, kulturo, klerigo kaj propagando — Dimo Martinov, laboro en lernejoj — Katja Mironova, membro — Vitan Obreŝkov.

Inĝ. D. Dobrev

Sevlievo. La 16-an de februaro ĉ. j. okazis la jara kunveno de la loka E-societo „Fratiga Stelo“. Ĉeestis 39 geesperantistoj. La prezidanto Ilija Ilijčev raportis pri la agado de la societo dum la pasinta jaro. Poste multaj el la partoprenintoj — M. Gálábov, P. Prodanov, G. Keremidčiev, C. Krástev, R. Račeva k. a. faris eldirojn. Oni substrekis la grandan rolon de la propagando por Esperanto, la bezonon de enkonduko de la internacia lingvo en la urbaj lernejoj. Oni elektis novan estraron: Ilija Ilijčev, Mandeva, Georgiev, Gančev, Dukov, Prodanov, Nikolov.

B. Mandeva

V. Tárnovo. La 13-an de marto 1966 okazis la jarkunveno de E-societo „Lumo“.

Oni konstatis ke la societo organizis ĉiusemajne siajn kunvenojn en la bela kaj oportuna klubejo en la Domo de la Ĉasistoj.

Por la gelernantoj ni organizis amuzon kun varia literatura-muzika programo.

Estis fondita junulara E-sekcio.

Dum septembro, antaŭ la maltermo de E-kursoj, ni organizis riĉenhavan kaj varian E-ekspozicion. Ĝi estis vizitita de pli ol 1000 personoj. Ĉiu estis tre kontenta kaj esprimis siajn bonajn impresojn en speciala kajero.

Nian urbon vizitis la hungara esperantisto Ferenc Balatoni. Ni organizis renkonton en kiu li projekciis filmon pri Budapeŝto. Tiu renkonto restis neforgesebla por la junaj geesperantistoj.

La 15-an de decembro—la naskiĝotago de Zamenhof, ni solene festis.

Ĉiuj aŭde ni kunvenas en la klubejo.

Nun funkcias la jenaj kursoj: en ekonomia teknikumo 4 kun 100 partoprenantoj; en dua gimnazio 1 kun 22 partoprenantoj; en konstrua teknikumo 1 kun 30 partoprenantoj; en medicina teknikumo 1 kun 10 studentoj; en sindikata domo 1 kun 24 personoj; por la komsomolanoj 1 kun 10 ptp; ĉe la lernejo „P. R. Slavejkov“ 1 kun 12 ptp; ĉe la junpionira domo 1 kun 15 ptp; ĉe la poŝtejo 1 kun 10 ptp. E-movado en nia antikva kaj pitoreska urbo vigligis.

Venelin Drumev

v. Pavel Banja, distrikto de Stara Zagora. La 10-an de marto ĉ. j. okazis la jara kunveno de E-societo „Supreniro“, kiun ĉeestis krom la lokaj anoj, ankaŭ gastoj el Kazanlâk. K-do Georgi Savov tralegis la raporton, post kio oni esprimis diversajn opiniojn. La prezidanto de la E-societo „Roza valo“ en Kazanlâk salutis la kunvenintojn kaj bondeziris al ili plian por- kaj peresperantan agadon.

Oni akceptis la societan planon por 1966 j., kaj elektis la novan estraron: G. Savov — prezidanto, Hr. Rastev — sekretario kaj Stefka Kucina — membro.

G. Savov

Sviŝtov. La 10-an de marto okazis la jara kunveno de E-societo „Danuba stelo“. Pri ĝia agado raportis la sekretariino Kr. Vasileva. En la urbo funkciis kurso por komencantoj en la ekonomia mezlernejo kiun gvidis Kr. Vasileva, du kursoj por komencantoj kaj progresintoj por civitanoj (gviditaj de Bejko Markov), kaj du kursoj por studentoj, ankaŭ gviditaj de B. Markov. Nun funkcias kursoj por studentoj, kiujn gvidas St. Ilčev. Ankaŭ estis kolektitaj subskriboj konekse kun la kampanjo al UN. Post detalaj diskutoj estis akceptita rezolucio por estonta agado de la societo.

Cočo Kolarov

Jambol. La 27-an de marto okazis la jarkunveno de nia E-societo. Ĉeestis k-do Matju Stojanov de la distrikta komitato de BKP, Veska Boneva kaj aliaj esperantistinoj el Sliven, Ĵeljazko Nenov el Elhovo, Vâlčo Georgiev el vil. Tenevo, Stoil Ivanov el vil. Botevo kaj aliaj. La jarkunveno estis vizitita de pli ol 80 geesperantistoj.

Raporton pri la agado dum la jaro faris k-do Dimo Trudoljubov, prezidanto de la societo. Li emfazis speciale pri la organiza laboro, pri la abonkampanjo al „Bulgara Esperantisto“ k. a. Li ne preterlasis ankaŭ la bonan laboron konekse kun la kolektado de subskriboj.

Por plibonigo de la organiza laboro k-doj Angel Stojanov, Kutju Zlatarov, Ĉonju Pančev, Bojan Kuŝev, Ekaterina Kamburova k. a. faris trafajn proponojn.

K-do Matju Stojanov parolis pri la helpo, kiun povas fari DK de BKP al la E-societo.

Estis elektita nova estraro de la urba societo kaj distrikta komitato de BEA. K-do A. Stojanov tralegis saluttelegramojn kiujn sendis k-doj Nikola Aleksiev, prezidanto de CK de BEA, docento G. Dimov el Varna, niaj honoraj membroj Penko Petrov el Sofio kaj Dimitr Kudev el Plovdiv.

La juna esperantistino Radka Ĉakmakova deklamis sian versaĵon en prozo.

Todorka Tončeva

Plovdiv. La virina sekcio ĉe E-societo „Kulturo“ organizis solenan celebradon de la 8-a de marto — la tago de la internacia virina solidareco. En la plenplena salono de la societo k-ino Meĉikjan prelegis pri la batalo de la virinoj en la tuta mondo por egalrajteco kaj mondpaco. Ŝi substrekis speciale la rolon de la bulgaraj virinoj kaj de la bulgaraj esperantistinoj.

Estis plenumita riĉenhava belarta programo. K-do Ajolov tralegis siajn versaĵojn, dediĉitajn speciale al la virina festotago. La esperantaj kantoj de la junuloj estis kantitaj de ĉiuj ĉeestantaj esperantistoj.

La festotago pasis en ĝoja, entuziasma kaj intima atmosfero.

Berta Meĉikjan

BONA KONTRIBUO

La bulgara popolo estas konata kiel laborema. Dum la lasta kvara kvinjaro, kiu plene sukcesis, gravan rolon okupis kaj ludis nia diligenta gejunularo.

Multaj sciencistoj kaj specialistoj kontribuas por la brila estonteco de la popolo.

La balotado por deputitoj-parlamentanoj, urbaj kaj distriktaj konsilantaroj kaj asesoroj okazis la 27-an de februaro sub la signo de plena venko de la Patrolanda Fronto en la tuta lando. La bulgaraj civitanoj voĉdonis unuanime por la paco, amikeco kaj feliĉo.

Tiun grandan feston ankaŭ la esperantistaro partoprenis kaj kontribuis per konvenaj sloganoj kaj agoj. En Ruse nia anaro dediĉis siajn fortojn



tiucele kaj plenumis la rekomendojn de CK de BEA. Ni aranĝis vitrinon kun konvena slogano, organizis Esperanto-renkontigon en Bjala, kie la junpioniroj de elementa popollernejo „Vasil Levski“ sub la zorgoj de samideano Mentov plenumis interesan programon. Pli ol 120 geesperantistoj el Ruse, Bjala, Borovo, Dve mogili, Obretenik kaj Batiŝnica signis la estontan agadon en la distrikto.

ЕСПЕРАНТСКИ ПОЗДРАВ ДО СТРОИТЕЛИТЕ

На 25 март 1966 г. в гр. Враца се проведе национално съвещание на строителите от „Заводски строежи“. Вечерта в уредения за тях поздравителен концерт взе участие и Младежният есперантски ансамбъл. Песните на младежите се посрещнаха с бурни ръкопляскания.

След концерта строители и есперантисти беседваха през време на уредената за тях другарска вечеря.

Е. Даскалов

ОСМОМАРТЕНСКИ КОНЦЕРТ

Представителният младежки есперантски ансамбъл изсесе с голям успех концерт пред строителите на Химкомбината във Враца. На сцената в препълнения салон на Химкомбината застанаха познатите на много есперантисти девойки и младежи с красива униформа, които под диригентството на Ангел Ангелов изпълниха богатата програма. С бурни ръкопляскания бяха посрещани и изпращани песните: „Весел дъжд“, „Чуден начин“, „Писмо до Пинокио“, „Да танцуваме“, „Хей Лили“, „Може би това е пролетта“ и др.

Това е вече деветият публичен концерт на младежкия ансамбъл на врачанските есперантисти.

Д.

Nikolo la Kolla kaj familio komunikas kun doloro ke la 5-an de februaro subite forpasis en Milano

Stefano La Colla

Lingva Akademiano kaj Honora Membro de U. E. A.

La entombigo okazis la 10-an en Palermo, kie li komencis, en 1908, sian sesdekjardaŭran altvaloran pioniran agadon por la disvastigo de Esperanto.

LA UNUA DE MAJO—FESTO DE LA TUTMONDA LABORISTARO

En la jaro 1886 je la unua de Majo la laboristoj en Ĉikago, Usono, strikis kaj postulis okhoran labortagon. Tion ili faris demonstracie. La rezulto estis sangaj interbataloj kun la polico. En la jaro 1889 dum monato julio, la Pariza Kongreso de la Dua Internacio aprobis la decidon ke unua de majo restu por ĉiam kiel internacia festotago de la monda laboristaro, aprezo de la fortoj de la laboristoj kaj de ilia solidareco.

Tiel, de tiam, en ĉiuj landoj sur nia planedo la laboristoj celebras tiun daton, kiu interfratigas kaj unuigas ilin.

Granda festo estas la Unua de Majo ankaŭ por la pioniroj de la nova vivo en nia kara patrujo, plej klara pruvo pri ilia krea laboro, simbolo de prospero kaj progreso. Honorinda kaj venkoplena estas nia laborfestoj, ĉar en ĝi estas efektivigitaj jarcentaj revoj de la laborista klaso. La unuamajaj kolonoj demonstras la kredan flamon de la pasintaj jaroj kiam oni konstruis la unuajn uzinojn kaj elektrocentralojn, ili portas la venkentuziasmon dum la konstruaj kvinjaraj planoj. Ili portas la impetan signon de la estonteco.

Je la unua de Majo la laboristoj el la

tuta mondo plenigas stratojn kaj placojn sub la glora ruĝa standardo de la internacia laborista solidareco, manifestas sian neŝanceblan fidelecon al la granda testamento de Markso, Engelso:

Proletoj de ĉiuj landoj, unuigu!

Dum tiuj solenaj tagoj ni ne forgesu menci tiujn kiuj verŝis sian sangon por la triumfo de la libereco.

La tempo kaj la bataloj pliriĉigis kaj kompletigis la signifon e tiu festotago, ĉar kune kun ĝi venis la printempo por la tuta homaro, kiu liberigis ĝin el la ĉenoj de la kapitalo.

La laboristoj estas tiuj, kiuj renovigos la mondon sur la fundamentoj de la libero kaj socialismo.

Vanaj estas la klopodoj de la imperiistoj per agitado kaj propagando neniiigi la unuecon en la socialisma mondo. Vanaj estas iliaj klopodoj haltigi la radon de la historio.

En tiu batalo sian kontribuon donas ankaŭ nia heroo kaj laborema popolo.

Brila festotago estas la Unua de Majo, ĉar estas hela nia socialisma vojo, klara estas nia celo, neŝancebla estas nia kredo en la konstruado de la revata komunisma socio.

Nikola K. Tarakĉiev

* * *

La Prezidanto de UEA sendis la jenan kondolencon al la familio Ivan Keremidĉiev Espirov en Sofia:

La 19-an de februaro 1966

Kara Keremidĉiev,

Kun granda bedaŭro mi ĵus eksciis pri la forpaso de via edzino.

Mi petas vin akcepti en mia nomo kaj en tiu de UEA la plej profundajn kondolencojn.

Mi ege esperas, ke la tempo helpos por mildigi la sendube tre grandan doloron, kiun vi nun sentas.

Kun tre koraj salutoj

kaj amika manpremo,

sincere via D-ro Ivo Lapenna

* * *

Radio Budapeŝt komencis siajn esperantlingvajn dissendojn la 1-an de februaro 1966 ĉiutage de la 20,30 ĝis la 20,45 h — laŭ Mezeŭropa horsistemo (21,30 ĝis 21,45 orienteŭropa horsistemo) — per la jenaj ondlongoj:

240 m	1250 kc/s
41,5 m	7220 kc/s
48,1 m	6234 kc/s

Bonvolu aŭskulti la programojn kaj skribu vian opinion, viajn konsilojn kaj dezirojn al la Radio **Budapeŝt**, VIII. Bródy Sándor u 57 (Redakcio de la Esperanto-disendoj).

De la 17-a ĝis la 24-a de julio 1966 en Elsinoro (Helsingör), Danlando, okazos Internaciaj Feriaj Kursoj. Kiu volas ricevi la prospekton senpage haveblan, skribu je adreso: Al s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyoj, Danlando.

INSULO „ESPERANTO“

Teksto kaj muziko de Georgi Stanev



Ho, venu, gefratoj, amikoj amataj,
 eksonu gajege la kanto,
 vi trovos liberon, frat'amon }
 kaj veron } 2
 nur sur la insul' Esperanto.

Jen vidu la stelon,
 ĝi montras la celon
 al ĉiu malgaja dubanto —
 la regnon de nia senmorta revado }
 en estas insul' Esperanto. } 2

ДО ВСИЧКИ ЕСПЕРАНТСКИ ДРУЖЕСТВА, МЛАДЕЖКИ ГРУПИ, ДО ВСИЧКИ ЕСПЕРАНТИСТИ В СТРАНАТА

На 2 юни 1966 г. тържествено ще се чествува във Враца 90-годишнината от гибелта на поета-революционер Хр. Ботев. Хиляди ботеви поклонници ще посрещнат построения със средства от пионерите кораб „Радецки“ на козлодуйския бряг. На легендарния връх „Вола“ във Врачанския Балкан ще се състои величествен митинг.

По този случай есперантското дружество „Сукцесо“ и младежката група „Христо Ботев“ организирват среща на българските есперантисти.

Срещата ще се проведе при следния ред:

1. Пристигане във Враца на 1 юни 1966 г. — посрещане и настаняване (по ученически квартири, училища и др.) до 19 часа

2. Вечер-заря от 20 часа.

3. Тръгване за връх „Вола“ на 2 юни — 4,30 часа. Сборен пункт — площад „Христо Ботев“.

4. В 11,30 часа в местността „Околчица“ — общ обяд, като за целта всеки си носи храна.

5. Отпътуване от Враца в 18 часа.

За да подсигурим места за преносване съобщете от колко мъже и жени се състои групата. Отделните есперантисти също да ни уведомят. Срок 20 май 1966 г.

Очакваме масово участие в срещата на българските есперантисти.

Справки и заявки на адрес:

Враца — Есперанто

ПК-74 (Е. Даскалов)



TURISTA SOCIETO
„ĈERNI VRAH“, SOFIO

TURISTA SEKCIO
„ESPERANTO“, SOFIO



Ni informas ĉiujn turistojn-esperantistojn, ke la ĉi-jara tradicia festo de la montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝamonto apud Sofio okazos de la 2-a ĝis la 3-a de julio.

Programo

La 2-an de julio, sabate, 20 horo. Monta vespero: literatura kaj muzika programo, elekto de montara feino, enigmokonkursoj, iluminado, kantado kaj dancado.

La 3-an de julio, dimanĉe, 10 horo. Anoncado de la gajnintoj en la turista literatura konkurso pri verkoj en Esperanto: rakontoj, versaĵoj, skeĉoj kaj anekdotoj. Interpretado de premiitaj en la konkurso verkoj. Sportaj konkursoj kaj turistaj lertecoj. De la 14-a horo diskutado je la temo „Kion ni devas fari por ke oni pli amase apliku Esperanton en la turismo“.

La dezirantoj partopreni la Feston aŭ la Literaturan konkurson devas informi la Organizan Komitaton plej malfrue ĝis la 25-a de junio 1966. Sen averto oni ne povas certigi al vi liron en la najbaraj montodomoj aŭ en tendo.

Subskribo — kampanjo

Ĉar la Jaro por kolektado de subskriboj estas plilongigita ĝis la fino de julio 1966, la Jarkunveno de E-societo en Subotica, Jugoslavo (okazinta la 13-an de februaro ĉ. j.), denove deklaris pasintjaran alvokon, sed nun ne nur por Jugoslavio, sed ankaŭ por ĉiuj societoj, grupoj kaj individuaj kolektantoj en tuta mondo. La tasko estas: kiu kolektos pli da individuaj subskriboj por JIK!

Kvankam la fonto de la individuaj subskriboj en nia urbo Subotica jam estas malpliigita

Bulgara turista oficejo aplikas Esperanton

Eksterlandaj esperantistoj kiuj deziras ferii en Bulgario povas peti materialojn pri la eblecoj fari tion per la Vojaĝoficejo „Pirin“ de Bulgara Turista Asocio, bulv. Tolbuhin 18, Sofio, Bulgario.

Bulgara turista karavano al Hungario

Okaze de la 51-a UK en Budapeŝto la estraro de la Turista Sekcio „Esperanto“ organizas ekskurson al Hungario. La karavanon al la lando de la 51-a UK rajtas partopreni nur aktivaj turistoj-esperantistoj. Detalajn informojn donas la Sekcio, poŝkesto 36, Sofio.

Esperanto en la Turista Domo en Sofio

Ek de marto k. j. en la Domo de la Turisto kaj alpisto en Sofio la estraro de la Turista Sekcio „Esperanto“ unu fojon ĉiumonate organizas vesperojn de la turistoj-esperantistoj. La vesperoj estas amase vizititaj ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de neesperantista publiko.

ni klopodos plialtigi la nombron 11700 al 16000 individuaj subskriboj. Ni varme deziras ke multaj urboj en ĉiuj landoj de la mondo nin superu, almenaŭ la pli grandaj ol Subotica (kun 110000 loĝantoj).

Ni esperas ke al nia alvoko kaj propono por konkuro reeĥos la geesperantistoj el ĉiuj kontinentoj.

Bogoljub Grabareviĉ

(Gvidanto de komisiono por JIK)

DEZIRAS KORESPONDI

Argentino

Adriana Cornu (Muzika profesorino), Francia 1462, Santa Fe. Interŝ. muzikdiskojn, infanajn muz-aĵojn kaj PM, kun ĉl. Nepre respondas.

Elisa Bertozzi (studentino), Villaguay 767, Paraná, interŝ. aĵojn, artajn revuojn, gitaran muzikon kun ĉl.

Zunilda Soncini (studentino), Juan del Campillo 2733, Santa Fe, interŝ. art-aĵojn, PK, monerojn kaj fotojn, famajn muzikojn kĉl.

Maria del Carmen Tevez (studentino), Diaz Colodrero 2022, Santa Fe, interŝ. PK kaj turistajn prospektojn kĉl.

Maria Teresa Crocci (studentino), 4 de Enero 2483, Santa Fe, interŝ. infanan muzikon, diskojn, PK, PM kaj folkloran muzikon kĉl.

Maria González (studentino), Lavallo 4747, Santa Fe — interŝ. PM, PK, monerojn kĉl.

Jorge Molina (muziko), boulevard Zavalla 3128, Santa Fe — interŝ. ĥoralan muzikon, infanan kaj folkloran, diskojn, literaturon, kutimojn kĉl.

Miguel Martinelli (studento), Martin Zapata 1249, Santa Fe — interŝ. literaturon pri evangelismo, diskojn, popolan muzikon kĉl.

Nidia N. Kópischi (studentino), San Lorenzo 1985, Santa Fe — interŝ. PM kaj PK kĉl.

Lazaro Fluri (Universitata profesoro), San Jorge (Santa Fe) — interŝ. popolan kaj folkloran muzikon, diskojn kaj kantojn kĉl.

Brazilio

Jacques Auguste Courbet (40-jara), Praja do Iamengo, 254 — Apto. 404 Flamengo-ZC-01-. Rio de Janeiro G. B. — dez. interŝ. P. M. kun ĉl.

Bulgario

Stefan Gerĝikov, ul. Aksakov 18, bl. „Stefka Ĉamurova“, Sliven, instruisto — interŝ. PM, PK, E-aĵojn kun ĉl.

D-ro Angel Tenĉev, Stara Zagora, str. Nedelĉo Nikolov 61-a — deziras korespondi kun ĉl. pri ĉt.

Kiĉka Petrova (18-jara), v. Hristo Milevo — Plovdivsko — kun gesamideanoj t. m. je diversaj temoj.

Kostadin Kostakev (42-jara), instruisto, Stara Zagora, str. Gladston 20, dez. korespondi kun la tuta mondo pri historio, pm. kaj libroj.

30 gelernantoj de 9-b klaso ĉe Unua mezlernejo en urbo Stara Zagora deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉt. Bonvolu skribi al Kostadin Kostakev, str. Gladston 20, Stara Zagora.

17-jaraĝaj gelernantoj el Sofio deziras korespondi kun ĉl. pri ĉt. Skribu al kursgvidanto Nikolaj Mihajlov, Sofio 39.

15-jaraĝaj gelernantoj deziras korespondi kun ĉ. l. pri ĉ. t. Skribu al Boĵidar Leonov ul. V. Kolarov 40, Sofio.

Ĉeĥoslovakio

Friederih Zöld (teknikisto), ul. Vystavby 1, Košice — kun ĉl, interŝ. insignojn, nacilingvaj gazetojn, gramofondiskojn, glumarkojn, diversajn etiketojn.

Otto Zurek (34-jara fizikisto), Zďár nad Sázavou — Vysoĉany 810, kun esperantistoj de la sama fako aŭ elektrotekniko.

Hungario

Miklós Kardos (16-jara, sudento), Bocskai u-6, Szeged — dez. kor. kun bulgaraj junuloj, kolektas P. M.

Fervojista Fakgrupo de la Hungara E-societo Magyar Eszperanto Szövetség Vasutas Szaksporttija Kiskunhalas — dez. ĝemeliĝi kun iu bulgara E-klubo. Interŝ. E-gazetojn, librojn, vizitojn dum la somero.

Maria Hiveš (14-jara knabino) dez. korespondi per BK kun geknaboj de la tuta mondo, Eger, str. Somogyi Béla-u 2.

Antonio Barasevich (teknikisto), Csákberey, Horoh tere 26.

Jugoslavio

Pavlinoviĉ Juroslav, Dubrovnik, Vicka Lovrina 2, kun bulgaroj.

Vukiĉ Srdjan (profesoro 35-jara), Split, Kod mosta 10, dez. korespondi kun la tuta mondo.


Pollando

Danuta Slivinska (16-jara lernantino), ul. Lidzbarska 16, Brodnica — dez. kor. kun bulgarinoj; interesiĝas pri filmoj, sporto, muziko, kolektas BK, PM, fotojn de filmaktoroj.

Z. S. Czesnowicz (30-jara, teknologo) str. Czerwonych Kosynierów 11/9, Gdynia 1 — dez. kor. kun bulgaroj; interŝ. PM, e-aĵojn, PK.

60 komencantaj gelernantoj el Technikum Spozwoze, str. Ktonowa 2, Zabrze, — dez. kor. kun la tuta mondo; interŝ. BK kaj PM. Skribu al instruistino R. Rokicka.

Henryk Maciejewski (19-jara), Zielun pow. Zuromin, woj. Warszawa), dez. kor. kun gemikoj el Bulgario; interŝanĝas PM, BK, pri muziko (precipe ĵazo), sporto, filmoj.



RADA

BORMAŠINO

PR 501

Destinita estas por traborado, „Zenker“-frezado, disskrapado de aperturoj kaj gravurado de mezkalibrilaj maŝinpartoj el gisfero, ŝtalo aŭ koloraj alojoj.

La prilaborado de la aperturoj estas farata laŭ projekta desegnado, ŝablonoj aŭ

kondukilaj metalplatoj.

La Rada Bormaŝino PR 501 posedas jenajn kvalitojn:

Elektrohidraŭlika sistemo de sinsekva kluĉado de la turnomovoj kaj la transdonadoj.

Antaŭelektado de la turnomovoj kaj la transdonadoj pere de maŝincilindroj dum la prilaborado aŭ dum nefunkciado.

Programigo de la turnomovoj kaj la transdonadoj per 30 pozicioj efektiveblaj sinsekve aŭ alterne.

Aŭtomata malkluĉado de la transdonado ĉe atingo de antaŭe fiksita profundeco.

Elektrohidraŭlikaj premfiksaj mekanismoj de la boraparato kaj la stativo.

Ebleco por premfiksado kaj malfiksado de la boraparato, sendepende de la stativo.

Maksimuma centralizado de ĉiuj direktorganoj de la funkciado.

Stabila strukturo de la korpaj maŝinpartoj, malebliganta nedezirolajn vibroj dum plej pezaj procedoj de traborado.

Utiligebla ekonomie profitodona ĉe unuopa, malgrandseria kaj seria produktado.

